

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet ♦ huhtikuu ♦ aprilo ♦ 2/2006



Najbaraj kontaktoj – Rezentantoj de Esperanto-Asocio de Finnlando, Sveda Esperanto-Federacio kaj Estona Esperanto-Asocio interŝanĝis spertojn 11-12 marto en Kimito, de SEF Bengt Olof Åradsson (prez.), Martin Strid, Beatrix Svenonius Strid (kasisto), Wim Posthuma, Roland Lindblom, de EEA Madis Linnamägi, Tõnu Hirsik (prez.), Lydia Lindla.

Ainutlaatuinen näköala kieliin, s. 24

**G.J. Ramstedt, p. 7 ♦ Unuaj mencioj pri Esperanto en Finnlando, p. 9
Valamo-kursoj, p. 14 ♦ Koulutuspäivä tiedottamisesta, s. 18**

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen aikakauslehti. Suomen Esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk tidskrift. Organ för Finlands Esperantoförbund.

Lingvopolitika periodaĵo. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.

Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo: ✉ eaflehti@esperanto.fi

Päätoimittaja/Chefredaktör/Ĉefredaktoro: *Mikko Mäkitalo*

Vanha Hämeentie 41 as. 9, 20540 Turku. ☎ (02) 2373 848 ✉ ef_redakto@surfeu.fi

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*

Mannerheimintie 40 D 86, 00100 Helsinki. ☎ (09) 587 6738 ✉ ilkka.santtila@welho.com

Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Anna Ritamäki*

Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo: 18 e/vuosi/år/jaro;

Jäsenille/ För medlemmar/ Por membroj: 12 e.

Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ (09) 715 538 ✉ eaf@esperanto.fi

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmogatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800017-230825.

Julkaisija/utgivare/eldonanto: Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Eldonkvanto: 400

Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto ry

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja/Ordförande: *Anna Ritamäki*

Brokärrvägen 89, 25700 Kimito. ☎ (02) 423 146 ✉ (02) 423 246 ✉ eafprezidanto@esperanto.fi

Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja/Vice ordförande: *Päivi Saarinen*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

Sekretario/Sihtööri/Sekreterare: *Tiina Oittinen*

Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 ✉ eafsekretario@esperanto.fi

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet / Övriga styrelsemedlemmar:

tuomo.grundstrom

Tuomo Grundström, Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ (050) 5180 590, (02) 822 7779 ✉ @lailanet.fi

Taneli Huuskonen, Lapinlahdenkatu 23 A 7, 00180 Helsinki. ☎ (09) 694 0964 ✉ taneli.huuskonen@netsonic.fi

Markku Saastamoinen, Siukolantie 9 H 12, 33470 Ylöjärvi. ☎ (050) 327 8528 ✉ markku.saastamoinen@jippii.fi

Börje Eriksson, Keiturintie 274, 16510 Luhtikylä. ☎ (03) 785 1191 ✉ esperarto@phnet.fi

Vicestraranoj/Varajäsenet/Suppleanter:

Timo Pirinen, Rinnetie 11-13 D 32, 06650 Hamari. ☎ (040) 592 1756 ✉ timo.pirinen@gmail.com

Raita Pyhälä, Jykyrintie 3, 69440 Lestijärvi. ☎ (06) 863 7351 ✉ saliko@kase.fi

Marjaliisa Parpala, Utinkatu 45 B 7, 45200 Kouvola. ☎ (05) 321 2866

Kasisto/Rahastonhoitaja/Kassör: *Tiina Kosunen*

Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ (09) 813 3024 ✉ eafkasisto@esperanto.fi

Pankkitili/Bankkonto (EAF): Sampo 800017-230825.

Peranto de UEA / Maksut UEA:lle / Betalningar till UEA:

Sampo 800020-5995369 (UEA/EAF Päivi Saarinen)

Adreso ĉe la EAF-oficejo. / Käytä Suomen Esperantoliiton toimiston osoitetta.

Officejo/Toimisto/Kontor: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17-19.

☎ (09) 715 538 (puh.vastaaja/respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

Internet: <http://www.esperanto.fi>



La plej bonaj – kiuj, kie?

Nu, vi jam scias. Esperanto-Asocio de Finnlando planas festi en 2007! Nun la planoj komencas konkretiĝi. Ni antaŭvidas multajn etajn

renkontiĝojn, feston ĉiuloke kie troviĝas aktiva esperantogrupo, eldonon de libroj aldone al tri ĉefaj festaj eventoj: solena jubilea festo je la datreveno de la fondiĝo la 28an de aprilo 2007 en Helsinko, internacia arta festivalo somere kaj altranga lingvopolitika seminario aŭtune. Nia ambicio estas inviti la plej bonajn prelegantojn, artistojn kaj fakulojn, kunlabori ankaŭ kun spertuloj tutlande konataj. Kiun vi ŝatus ke ni invitu?

La datoj kaj lokoj por la internacia festivalo kaj la seminario estas ankoraŭ malfermaj. Nia celo estas videbligi nian lingvon tutlande. Kion vi pensas pri Joensuu aŭ Kuopio por la festivalo, pri Rovaniemi aŭ Oulu por la seminario? Ni bezonos helpon de homoj, kiuj jam konas la eblecojn en diversaj partoj de nia lando. Ĉu vi scias pri bona ejo en bone atingebla loko? Ĉu vi havas kontaktojn al lokaj decidantoj?

Ni krome bezonas financajn rimedojn por sukcesi. La ordinaraj asociaj rimedoj neniel

sufiĉos ĉar por la realigo de tiom ambicia programo ni bezonas ankaŭ profesion laborforton por kunordigi la grandan volontulan laboron. Ni planas okazigi monkollekton, kies celo estos ankaŭ fortigi la financon bazon de la asocio. Ni nun preparas la formalizaĵojn. Ni ankaŭ petas viajn konsilojn pri fondaĵoj, pri ŝtataj subvencioj kaj kunlaboraj vojoj, kiuj povos plifaciligi la realigon de niaj jubileaj aranĝoj.

Bona signo estas ke la membroevoluo de EAF turniĝis al kresko, 379 membroj en 2005, 17 pli ol en 2004. Junulara FEJO kun EsperHe kaj blindula Steleto komune kontribuis per 35-membra salto. Aparte grava estas la aktiviĝo de EsperHe (Esperanto en Universitato de Helsinko) kun kiu EAF kunlaboras pri la trejnseminario en majo. Ĝi preparos vin por abunda informa laboro. Ankaŭ la kluboj Jyväskylä, Oulu kaj Turku montris etan kreskon kaj ni antaŭvidas daŭrigon. Vi ja ĉiuj prizorgos okazigon de kursoj aŭtune, ĉu ne? Kaj ĉu vi jam aktive reklamis la ĉi-jaran kurson en Valamo? Ĝi rekomendindas! Inspira estas ankaŭ vizito al Hämeenlinna aŭ internacia vojaĝo.

Aktivan printempon kaj someron deziras

Anna Ritamäki

Lastminuta informo ...

Stipendejä tarjolla! Esperanton kesäkurssi 3.-7.7.2006 (ks. s. 14). Vapaamuotoiset hakemukset pe 26.5. mennessä kurssivastaavalle (Oittinen).

Stipendieerbjudande! Esperantosommarkurs 3-7.7.2006 (s. s. 14). Fritt formulerade ansökningar senast fre 26.5. till kursansvariga (Oittinen).



Epidemiaj zorgoj

Ni dum lastaj monatoj observis, kiel birda influenzo disvastiĝis en novajn landojn. El Finnlanda vidpunkto aspektas, ke kvazaŭ sieĝa cirklo fermiĝas ĉirkaŭ ni: aŭtune la plej proksimaj kazoj de la birda influenzo ekzistis en foraj aziaj partoj de Rusio kaj en Ukrainio kaj Turkio, pli poste ĝi aperis ĉe suda rando de la Balta maro, kaj lastatempe jam en Svedio.

Certe la malsano ankoraŭ atingos ankaŭ Finnlandon. Multaj atendas, ke la laŭsezono migrantaj birdoj, el kiuj plejparto atingos nian landon dum aprilo, portos ĝin ĉi tien. Tiel ja povos okazi, kvankam en la mondo la malsano verŝajne disvastiĝis pli multe per internacia komerco de viandoproduktaj birdoj ol per migrado de sovaĝaj birdoj.

Pandemioj ne estas nova afero en la mondo. Diversaj malsanoj tra epokoj kaŭzis drastajn influojn en la direktojn de la evoluo de grandskalaj okazoj. Febra epidemio detruis grandan armeon de la franca estro Napoléon survoje konkeri Rusion. La pionira fizikisto kaj matematikisto Isaac Newton laŭdire inventis multajn novaĵojn, kiam lia universitato pro epidemio estis fermita kaj li loĝis izolita en kampara bieno, kaj en tiea trankvilo filozofumis pri aferoj. Kelkaj epidemioj detruis tutajn indianajn kulturojn en la 16-a jarcento kaj faris por eŭropanoj pli facile konkeri la tutan kontinenton de Ameriko.

Iam povas eta okazo kaŭzi enormajn sekvojn. La verŝajne plej konata pesta epidemio en la mezo de la 14-a jarcento mortigis kvaronon de la tiama loĝantaro de Eŭropo. Pri la deveno de la malsano oni apenaŭ havas ekzaktan scion, sed

laŭ supozoj sufiĉis, ke unu ŝipo venanta el transmara haveno kunportis aron de specio de rato, kiu ĝis tiam ne ekzistis en Eŭropo, kaj kun tio la malsanon.

Nova trajto koncerne la epidemiojn ja estas, ke per moderna medicino la homaro ekde lastaj jardekoj havas realan kapablon kontroli epidemiojn. Unu epidemiozan malsanon, variolon, la moderna medicino jam tute malaperigis el la mondo, kaj pri kelkaj aliaj, almenaŭ pri poliomiĵelito, obstakloj por neniigo ŝajnas esti pli multe sociaj, ekonomiaj aŭ edukaj ol manko pri medicinaj rimedoj. Ĉu la homaro jam spertis la lastajn verajn pandemiojn aŭ ĉu novaj nur atendas nin, pri tio ni havas nur supozojn kaj divenojn. Estus certe tro kuraĝe supozi, ke homaro komencos vivi tute sen malsanoj, sed io pri la kapabloj kontraŭi epidemiojn certe ŝanĝiĝis.

Alia ŝanĝo de la mondo estas, ke nuntempe homoj ĝenerale vojaĝas inter kontinentoj. Tio signifas, ke virusoj kaj bakterioj rapide disvastiĝas inter kontinentoj. Tio povas ŝajni timige, sed alia flanko de la afero estas, ke se la lokaj loĝantaroj ĉie en la mondo daŭre kontaktas kun ĉiaj virusoj kaj bakterioj, la epidemioj neniam povas ekfloreiski en ekstrema formo. Se naskiĝas ekstreme danĝera nova virustipo, ĝi antaŭ nelonga tempo trafos homaron tra la mondo, kaj la homaro, per unu aŭ alia maniero, venkas la viruson aŭ adaptiĝas al ĝi. Kio okazis por la indianoj dum la 16-a jarcento, ne povus okazi en la nuna mondo, ĝi estis sekvo de preskaŭ plena izoliteco dum jarcentoj, eĉ jarmiloj.

Mikko Mäkitalo

Viglaj Vintraj Tagoj en Turku

Proksimume 50 esperantistoj kolektiĝis en Turku la 25-an de marto por partopreni la ĉijarajn Vintrajn Tagojn de EAF. La temo de la tagoj estis "Esperantohistorio en la plej malnova urbo de Finnlando" kaj la ejo estis civitana instituto Aurala, kie oni jam dum pluraj jaroj povas lerni Esperanton.

Post renkontiĝo kun malnovaj kaj novaj konatuloj en la vestiblo okazis malfermo kaj du prelegoj. Unue Martti Vihanto prezentis al ni filateliion (kolektadon de poŝtmarkoj) kaj precipe ekzemplojn de esperantaj objektoj el sia kolekto. Estis interese aŭdi pri la reguloj de filatelio kaj vidi esperantajn raraĵojn, pri kiuj mi ĝis nun nenion sciis. Krome mi persone aprezas la konsilojn, kiujn mi ricevis kiel multjare "silentinta" filatelisto. Eble mi tamen iam aktiviĝos. Kiu scias?

Due d-ro Väinö Havu prezentis en sia prelego la historion de malsanulejaj cirkonstancoj en Turku, aparte el sia vidpunkto kiel dermatologo. Oni ja devas miri, kiel multe la sanservoj evoluis dum jarcentoj kaj kiel primitiva la situacio estis ankoraŭ antaŭ unu jarcento.

Post paŭzo Carola Antskog parolis pri la planata historio-verko de EAF kaj pri Nino Runeberg, pri kies vivo oni lastatempe trovis pliajn faktojn. La historio-projekto progresas, kvankam malrapide.

Sekvis kafopaŭzo kaj post tio kunvenoj de diversaj fakaj societoj. Tiuj, kiuj ne devis partopreni ilin, povis intertempe babili inter si kaj rigardi la ekspozicion starigitan en la vestiblo.

La vespera programo komenciĝis per la akcepto de Societo Nino Runeberg, kiu lastjare havis pli da membroj ol iam antaŭe. La turkuaj aranĝintoj planis distran vesperan programon kun kantado, muziko, prezento de la loka dialekto ktp. Plej amuza etis certe la rokbanda prezento.

Post la komuna programo deko da interesitaj esperantistoj veturis ankoraŭ al la observejo de la loka universitato, kie ili povis observi planejojn kaj aliajn ĉielajn fenomenojn gviditaj de Mikko Mäkitalo. Feliĉe la vetero estis sennuba.

La dimanĉo komenciĝis, kiel kutime, per matenpreĝo organizita de KELF. Sekvis la jarkunveno de EAF laŭ kutima tagordo kaj post tio



Muzikantoj en la vespera programo de la Vintraj Tagoj.



Martti Vihanto prelegis en Vintraj Tagoj, fone bildo pri Esperanto-tema poŝtmarko.

Verkahovi, kaj post tio jam estis tempo por disiĝi kaj veturi hejmen.

Vintraj Tagoj plurfoje enhavis pli malpli nur oficialajn kaj laŭstatutajn programerojn, sed la pasintaj en Turku estis sufiĉe bona kunmetaĵo de oficialaj ĉiufaj kaj lokaj malpli seriozaj eroj. La partoprenantaro estis pli granda ol lastatempe – eble pro tio, ke la lastaj Aŭtunaj Tagoj okazis en Lesjöfors, en Svedio (estas tamen bonege pro la nordia kunlaboro kunveni iam ekz. ĝuste en Svedio). Kuraĝige estis ankaŭ aŭdi, ke la membronombro de EAF post longa tempo unuan fojon iom kreskis. Ni esperu, ke la kresko daŭros!

Nun nin atendas la sekvaj Aŭtunaj Tagoj en Haukipudas, sed antaŭ ili okazos jam pluraj aliaj aranĝoj por partopreni. Kaj ni jam preparu nin por la centjariĝo de EAF venont-printempe.

Dankon al turkuaj esperantistoj pro bone aranĝitaj Vintraj Tagoj!

Jukka Laaksonen

▷ rapida kafumado. Poste ni enbusiĝis kaj komenciĝis rondveturo en la urbo. La ĉiĉerono Jorma Ahomäki kondukis nin por rigardi plurajn lokojn, kie okazis gravaj aferoj rilate Esperanton. Ni vidis lokojn, kie loĝis aŭ laboris famaj esperantistoj, kie la lokaj esperantistoj kunvenadis, kie Esperanto estis instruita, kie mondfamaj esperantistoj iam prelegis aŭ faris paroladojn, kie oni publikigis esperantajn librojn ktp. Jorma sciis vere rakonti interese kaj spici sian paroladon per amuzaj detaloj. Dankon aparte al li!

Sekvis ankoraŭ komuna, bona lunĉo en la restoracio



Tiina Oittinen dankis Martti Vihanto pro la prelego.

G. J. Ramstedt – poliglota lingvisto

“La tagoj de homo estas kiel herbo.....pasas super ĝi vento.....kaj ĝia loko ĝin jam ne rekonas.” La Psalmo de David (103:15-16) gvidis miajn pensojn, kiam mi strebis trovi la iaman loĝlokon de prof. d-ro G. J. Ramstedt (1873-1950). La urboparto Raunistula en Turku estas alloga kaj rava promenejo. Tie ankoraŭ staras la modesta hejmdomo de konata lingvisto, diplomato, universitata profesoro kaj esperantisto. Lokaj homoj helpis min, sed ili nenion plu sciis pri mondfama viro forpasinta jam antaŭ pli ol 50 jaroj. Feliĉe esploristo, profesoro Harry Halén skribis pri li tre detalan biografion 371-



Ramstedt fotita dum profesoreco en universitato de Helsinko.

paĝan, sed bedaŭrinde nur en la angla lingvo. Iuj parencoj kontraŭstaris la finnlingvan eldonon. La verko aperis sub la nomo “Biliktu Bakshi” en la speciala libroserio de Finna-Ugra Societo en Helsinko 1998.

Tre fascina estas lia agado en Tokio 1919-1929. Li estis la unua ambasadoro de sendependa Finnlando en malproksima Japanio, kies lingvon nia reprezentanto rapide lernis. En la jaro 1926 decembre li faris prelegon pri metodoj de finna agrikulturo. Ĉeestis juna japana verkisto Kenĵi Miyazawa (1893-1933), kiu interesiĝis pri fremdulo parolanta la japanan lingvon. Li vojaĝis entute 18 horojn el sia hejmurbo Hanamaki al Tokio, ĉar li emis konatiĝi kun finnaj kultivaj metodoj kaj Esperanto. Ekestis reciproka amikeco. En septembro 1991 vizitis en Helsinko Tahei Satoo el Hanamaki. Li esploris la rilatojn inter tiuj ĉi du viroj. Nune la libroj de la menciita japana verkisto estas furoraj en malproksima Nipono. Du el ili aperis ankaŭ en Esperanto: “Goosh la ĉelisto” kaj “Nokto de galaksia fervojo”.

“Korea gramatiko” de Ramstedt aperis 1939. Tiu publikaĵo estis la unua scienca priskribo de la korea lingvo. Ni povas fieri pro tiel brila atingaĵo de konata finna lingvisto. Pli poste juna studento Songmoo Kho (1947-1993) en la jaro 1967 ekstudis en la Universitato de Helsinko. Li konis nur la nomon G. J. Ramstedt kaj emis sekvi lin sur scienca tereno. Tre kolore juna koreano rakontas pri siaj fazoj en Helsinko finnlingve en la verko “Rakkaudesta yliopistoon” (Yliopistopaino 1990). Laŭ la propono de Songmoo Kho la registaro de Koreio decidis transdoni al G. J. Ramstedt en la jaro 1982 honormedalon, kiun akceptis la nepino Birgitta Tikkanen.

Oni povas aliflanke kuraĝe aserti, ke G. J. Ramstedt daŭre vivas inter esperantistoj. Kiel

ni tion povas kompreni? En niaj klubaj kunvenoj komunaj kantoj estas ŝatataj programeroj. Facile homoj forgesas la nomojn de verkistoj kaj tradukantoj, sed jam kelkaj aludoj plivigliĝas nian memorkapablon. “Unu rozo kreskadis en verda val’.” Ĉiu finno konas ĉi tiun belan popolkanton, kiun majstre tradukis nia prestiĝa korifeo, modesta laŭ karaktero. Alia ekzemplo. “En malproksima Nordo lagego kaŝas sin...”. Kiel tradukanto Ramstedt talente pentras per sia vortara peniko – ni citas: “Someran tempon vidas ĝi en fojnmonato, en juli’...”. Supozeble estas facile samopinii pri la menciitaj detaloj.

En sia freŝa retroŝta mesaĝo Markku Sarastamo rekomendis la verkojn “Lähettiläänä Nipponissa” kaj “Seitsemän retkeä itään”. Ili estas vere legindaj. Se vi tristas, certe viaj okuloj brilos post la legado. Ramstedt kapablas rakonti vigle kaj kolore. Bedaŭrinde la libroj ne aperis en la Internacia Lingvo. Kiam nia nova ambasadoro ekiris al Tokio en la jaro 1919, li devis atendi konvenan ŝipon en Londono. Tial li trankviliĝis en marista hejmo ĉe finnlingva preĝejo. Poste li ricevis riproĉojn el Eksterlanda Ministerio, ke Ekscelencaj Moŝtoj devas utiligi pli luksajn lokojn. Eble nuntempe li estus ricevinta laŭdojn, ĉar nia ŝtato agas hodiaŭ ege ŝpareme. Sen argumentoj ni esperantistoj rajtas fieri, ke nialanda movado havis jam antaŭ pli ol cent jaroj tiajn, tre kuraĝajn kaj talentajn avanajn agemojn. La memoro de G. J. Ramstedt vivas kaj montras al ni sekvindan vojon. Ni ĝoje flirtigu



Gustaf John Ramstedt en jaro 1898, dum unu el siaj lingvistaj esplorvojaĝoj, kun sia filino en vilaĝo de mari-gento en meza Rusio.

nian verdan standardon je honoro de niaj pioniraj samlingvanoj sur la sojlo de la centjariĝo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Jorma Ahomäki

Kiu estas la plej grava finna esperantisto?

Proksimiĝas la tempo, ke EAF iĝos centjara organizo. Unu ideo por jubilei la okazon estas fari nomumon de la plej grava finna esperantisto. Por tio ni dum tiu ĉi jaro en Esperanta Finnlando prezentas aron da kandidatoj, por kiuj la legantoj en fino da la jaro voĉdonos.

En la gazeto numero 1 estas prezentita Nino Runeberg kaj en tiu ĉi numero G. J. Ramstedt.

En la postaj numeroj iĝos prezentataj almenaŭ Vilho Setälä, Joel Vilkki, Tyyne Leivo-Larsson, Irja Klemola kaj Albin Sandström. La historia laborgrupo disvolvis ĉi tiun liston de kandidatoj, sed se vi pensas, ke nepre iu alia indos esti aligitita al kandidataro, kontaktu la ĉefredaktoron.

(mm)

Unuaj mencioj pri Esperanto en Finnlando

Diversaj fontoj indikas, ke Esperanto venis al Finnlando en jaro 1888, sed estas neeble trovi, kiu estis la unua esperantisto en Finnlando. La novaj fontoj por esplorado igis serĉadon de informoj el malnovaj gazetoj multe pli facila ol antaŭe. La historia gazetar-arkivo estas servo, kiu estas malfermita por ĉiuj (*Historiallinen sanomalehtikirjasto*; <http://digi.lib.helsinki.fi/>). En tiu arkivo estas haveblaj en elektronika formo ĉiuj finnlandaj gazetoj ĝis la jaro 1890. Eblas ankaŭ serĉi per vortoj el la enhavo de tiuj gazetoj.

Serĉo de vorto "Esperanto" donas kvin rezultojn. La plej frua el ili estas el la jaro 1888. En gazeto *Hufvudstadsbladet* (svede Ĉefurba gazeto) 18.5.1888 aperis priskribo de la enhavo de svedlingva kultura revuo *Finsk Tidskrift* (Fina Revuo) majo 1888. Tamen la digitala biblioteko (ankoraŭ) ne estas kompleta. Erik von Hertzen menciis en *Esperantolehti* 4/1994, ke en *Åbo Tidning* (svede Turku-a gazeto) aperis artikolo pri Esperanto eĉ pli frue, la 3-an de decembro 1887. En duonpaĝa artikolo G. C. (laŭ Erik von Hertzen li estis Gustaf Cygnaeus) skribis surbaze de la germana eldono de la Unua libro kaj eventuale li estas la unua esperantisto, aŭ almenaŭ inter la unuaj, kiuj konatiĝis kun Esperanto en Finnlando.

Finsk Tidskrift ne estas inkluzivita en la reta arkivo, sed ĝiaj numeroj troveblas en universitataj bibliotekoj. En *Finsk Tidskrift* 5/1888 aperis recenzo de la germanlingva Unua libro de Zamenhof. Ankaŭ volapük estas menciita kaj la nova lingvo estas prezentita kiel ĝia konkuranto. La opinio de la recenzinto ne estis tute pozitiva kaj li proponis kelkajn ŝanĝojn al la lingvo, i.a. ke necesus forigi finaĵojn kaj anstataŭi ilin per prepozicioj, kaj ke necesus eviti similajn vortojn kun aliaj lingvoj, ekzemple la sveda vorto *vi* es-

tas en Esperanto *ni* kaj la sveda vorto *ni* estas en Esperanto *vi*. La recenzanto vere konatiĝis kun la enhavo de la Unua libro kaj ankaŭ li apartenas al la unuaj, kiuj konatiĝis kun Esperanto en Finnlando. Povas esti, ke la libro estis ankaŭ vendata en finnlandaj librovendejoj jam tiam. La recenzo estis subskribita per F.G., kiu verŝajne signifis la eldonanton de la revuo, Fredrik Gustafsson.

Jen la artikolo de *Finsk tidskrift*.

D:r Esperanto: Internationale Sprache; 48 s. 8:o med tabeller. Warschau 1887. Gebethnet et Wolff; 40 pf.

D:r Esperanto eller L Samenhof, som förf. tyckes heta, vill konkurrera med volapyk utan att närmare redogöra för sin afvikelse därifrån. Hans språkprof på vers och prosa äro emellertid nästan mer tilltalande än volapykisternas. De omkring 900 ordens genomgående och i ögonen fallande likhet med latinet och de romanska språken underlättar nämligen deras begripande; de icke många ändelsernas antal kunde förminskas, t. ex. genom borttagande af onödiga suffix för substantivstam samt för nominativ och accusativ. För betecknande af målet för en rörelse borde skild preposition användas; vissa grammatiska företeelser, såsom gradus och verbets former, borde åtskiljas med tydligare ord, mindre med ändelser, hvarjämte förvillande likheter med andra språk borde undvikas – *vi* t. ex. skall betyda *du*, *ni* åter *vi*. – Förf. ämnar samla tio miljoner – icke färre! – människors löften enligt bifogadt formulär angående språkets användande, hvarefter det skulle proklameras som världsspråk. Tänkbart vore att staternas handelsministrar kunde tillsätta en internationell komité, som skulle utarbete ett internationelt tungomål eller väl endast skriftspråk; om man finge ett enkelt sådant till stånd, kunde dess bruk på någon

vecka inläras i handelsskolorna. Mer kan man ej gärna vänta sig, men det vore likväl mycket mer än det nautiska signalspråket.

F.G.

En la finna lingvo la unua mencio pri Esperanto aperis la 25-an de novembro 1890 en gazeto *Savo* (Savonio) en Kuopio. Tiu gazeto rakontis pri nova universala lingvo, kiu estas inventita, ĉar volapük ne placas al ĉiuj pro ĝia malbeleco. Laŭ *Savo* la nova lingvo similas al la hispana kaj estas belsona. Por montri ekzemplon de tiu lingvo la gazeto publikigis poemon de Heine en Esperanto.

Uusi maailmankieli. Wolapük ei rumuutensa vuoksi näy kaikkia miellyttävän, vaan on eräs puolalainen lääkäri keksinyt uuden maailmankielen jota kutsuu ”Esperantoksi”. Sanakirja ei vielä ole suuri: siinä on vaan 20 lyhyttä pals-taa; ja koko kielioppi mahtuu kolmelle sivulle. ”Esperanto” on vokali-paljoutensa vuoksi kaurista ja sointuvaa; se tuntuu suuresti muistuttavan espanjan kieltä. Sanat ovatkin enimmäkseen romaanisista kielistä otettuja. Näytteeksi painamme seuraavan värssyn eräästä Heinen runosta, joka on käännetty ”Esperanto” kielelle:

En songo princinon mi vidis
Kun vangoj malsekaj de ploro
Sub arbo, sub verda si sidis

Tiel, sen supersignoj!

Pri Esperanto aperis artikoletoj ankaŭ en *Hufvudstadsbladet* la 12an de novembro 1890 kaj en svedlingva gazeto *Finland* (21.11.1890), kiu rakontis pri tio, ke Leo Tolstoj fariĝis subtenanto de Esperanto kaj en finnlingva *Wiipurin Sanomat* (28.11.1890), kie aperis plejparte la sama teksto kiel en *Savo*. Do, en novembro 1890 subite komencis aperi multaj mencioj pri Esperanto, sed kial?

Parenteze, estas interese noti, ke pri volapük aperis inter 1884-1890 entute almenaŭ 98 mencioj en 16 gazetoj. El tiuj mencioj 21 estis en finnlingvaj gazetoj kaj la resto en svedlingvaj. Plej multaj mencioj pri volapük aperis en jaro 1888, sed ankoraŭ en 1890 pri volapük aperis 16 mencioj. Evidente tiutempe inter tiuj rondoj, kie Esperanto disvastiĝis, volapük estis konata afero kaj Esperanto aperis kiel ĝia konkuranto.

Jukka Pietiläinen

Aŭtunaj Tagoj en Haukipudas

Esperanto-societo de Oulu aranĝos la Aŭtunajn Tagojn 16-17.9.2006 en Haukipudas en la hotelo Samantta. Haukipudas situas ĉirkaŭ 20 km norden de Oulu. La busoj trafikas el kaj al Oulu, sed ni klopodas aranĝi pli malmultekostan veturadon helpe de la loka sport-asocio.

Osmo Buller estas promesinta partopreni. Do, li espereble havos ian prelegon.

La eta preĝejo de Haukipudas estas fama pri la pentraĵoj de preĝej-pentristo Mikael Toppeilius. Esperanto-orgenisto Esa Toivola el Kuopio planas havi koncerton sabatvespere en la loka preĝejo. Ni ankaŭ planas viziton al ŝtonepoka Kierikki-centro en Yli-Ii. La loko situas

antaŭ miloj da jaroj ĉe la marbordo. Tie troviĝas interesa muzeo kaj i.a. “vicdomoj”, kiuj estas konstruitaj laŭ la modelo de ŝtonepoko. Loĝas en Haukipudas konatulo, kiu kaptas petromizojn. Li promesis rakonti, kiajn procesojn la mizeraj petromizoj travivas antaŭ ol ili kuŝas sur la vendotabloj ekzemple de Stockmann, je prezo 2,90 e.

Ni ouluanoj esperas, ke vi pasigu ĝojajn tagojn en la norda Finnlando.

Elkore bonvenon!

En la nomo de Esperanto-asocio de Oulu

Auli Vihermä

Patrik Austin **Aganto de la jaro 2005**

Patrik Austin estas nomumita Aganto de la jaro 2005 de Esperanto-Asocio de Finnlando pro sia kontribuo al la esperantlingva kulturo kaj sia inspira lingvoinstruado.

La agado de Patrik Austin grave kontribuis al la konateco de esperanto interrete, radie, televide kaj gazetare. La esperantlingvan jaron en januaro 2005 enkondukis la kompaktdisko *Rebela sono* de la bando Dolchamar, kies gvidanto, verkisto kaj kantisto li estas. Gravan rolon li ludas ankaŭ kiel prezidanto de Finnlanda Esperantista Junulara Organizo.

Patrik Austin troviĝas inter la motoroj de la altkvalita kaj multflanka Kultura Esperanto-Festivalo, kiu realiĝis en Helsinko en julio. Kiel lingvoinstruisto li estas inspira kaj novpensa tiel formante ankaŭ tiukampe ekzemplon por aliaj.

Esperanto-Asocio de Finnlando volas inspiri lin al plua aktiva agado per la sekva donaco:

– du ankoraŭ ne eldonitaj kompaktdiskoj freŝe liverotaj de Vinilkosmo



– Manlibro pri Instruado de Esperanto eldonita de ILEI en 2005

– enkadrigita Duplusto-desegnaĵo inspirita de la granda gazetara sukceso de Dolchamar

En Vintraj Tagoj de EAF en Turkuo, la 26an de marto 2006

Anna Ritamäki, prezidanto
Tiina Oittinen, sekretario

Stefan Maul en maja **Malferma Tago**

Stefan Maul, konata Esperanta ĵurnalisto kaj redaktoro de la magazino *Monato*, estos la ĉefa gasto en la Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA sabaton, la 13-an de majo. Maul prezentos dum la Tago sian ĵus aperintan verkon "El verva vivo ĵurnalista", en kiu li interalie klopodas klarigi, kial li estas kaj restas konvinkita adepto de la ideo de L.L. Zamenhof. Nekutiman prelegon faros profesoro Ruĝnazul', por kiu la elpaŝo en la maja Malferma Tago estos premiero en tiu ĉi populara aranĝo, kiu okazos jam por la 24-a fojo. Premieran prezenton spertos ankaŭ la filmo de Petro Balaz pri la pasintnovembra Malferma Tago kaj pri la vivo en la Centra Oficejo. Oni montros ankaŭ filmon pri la Esperanto-rilata kvizo en la ĉi-jara Muzea Nokto de

Roterdamo.

Kiel tradicie, la vizitantoj povos profiti de rabatoj en la libroservo kaj gajni esperantaĵojn en senpaga loterio. Kafo kaj teo, ankaŭ senpagaj, estos varmaj la tutan tagon. La Malferma Tago daŭros de la 10-a ĝis la 17-a horo.

(el komuniko de UEA prenis mm)

Konferenco de instruistoj

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) okazigos sian 39-an konferencon je 2006-07-25/29 (mar/sab) en Parma, Italio, ne malproksime de la ĵus okazonta UK. Ankaŭ la kongresa temo ĉi tie estas simila: Lingvaj rajtoj, lingvolernado kaj edukado por ĉiuj. Pli da informoj sur la oficiala paĝo http://www.ilei.info/agado/konferenco_2006.php

(el TEJO-aktuale koncizigis mm)

Kolker kvaran fojon plej vendita

Kiel ĉiujare ekde 2002, "Vojaĝo en Esperantolando", estis la plej multe vendita titolo en la Libroservo de UEA en 2005. Plejparte la Libroservo vendis ĝin al aliaj libroservoj, kursgvidantoj k.a. kvantaj aĉetantoj, dum ĉe la pinto de la statistiko de unuekzempleraj aĉetoj estas alia novaĵo de UEA, "Sed homoj kun homoj" de Z.M. Sikosek, kiun aĉetis 62 individuaj klientoj.

En la listo de ĉiuj vendoj 11 titoloj el 20 estas eldonaĵoj de UEA aŭ TEJO. La plej sukcesa titolo de alia eldonejo estis la bildvortaro "Mil

unuaj vortoj en Esperanto" (173) kaj la nova volumo kun aventuroj de la bildstria heroo Tinĉjo (165). Notinda estas la bona vendiĝo de "Manlibro pri instruado de Esperanto" (101), redaktita de K. Kovats, kaj "Historio de Esperanto" (86) de A. Korĵenkov. Ambaŭ estas verkoj, por kiuj ekzistis vera merkata bezono, kaj sekve la venda sukceso venis kiel natura rezulto.

La totala malneta vendosumo de la Libroservo estis 128 021 eŭroj, kio superas per 5,5% la vendojn en 2004. Ĉar la nederlanda inflacio estis 1,7%, temis pri rimarkinda reala kresko.

(el komuniko de UEA koncizigis mm)

Vendoj entute (numero – titolo – prezo en EUR)

- 440 "Vojaĝo en Esperantolando", Boris Kolker* (18,00)
- 369 "Pasporta Servo, listo de gastigantoj"* (15,00)
- 267 "Sed homoj kun homoj", Z.M. Zikosek* (21,00/30,00)
- 263 "Saluton!", lernolibro de A. Childs-Mee* (10,80)
- 173 "Mil unuaj vortoj en Esperanto", bildvortaro de H. Amery (12,00)
- 165 "Tinĉjo en Tibeto", bildrakonto de Herge (11,70)
- 136 "Gerda malaperis!", Claude Piron (3,90)
- 105 "La Zamenhof-strato", L. Zaleski-Zamenhof / R. Dobrzynski (18,00 / numerita 30,00)
- 101 "Manlibro pri instruado de Esperanto", red. K. Kovats (7,50)
- 99 "Pocket Esperanto Dictionary", A. McLin* (15,00)
- 94 "Ĉu nur-angla Eŭropo?" R. Phillipson* (21,00)
- 88 "Asteriks ĉe la olimpiaj ludoj", Goscinny / Uderzo (9,00)
- 86 "Historio de Esperanto", A. Korĵenkov (12,00)
- 82 "Gastono 1", bildrakonto de Franquin (7,20)
- 78 "Plena ilustrita vortaro de Esperanto" (87,00)
- 74 "Konciza etimologia vortaro", A. Cherpillod* (broŝ. 19,80 / bind. 24,90)
- 72 "Baza Esperanta radikaro", Wouter Pilger* (7,50)
- 72 "Faktoj kaj fantazioj", Marjorie Boulton* (13,80)
- 72 "Internacia Kongresa Universitato 2005", red. A. Wandel* (7,80)
- 67 "La Kastelo de Vitro", romano de J. Francis* (18,00)

* Eldonaĵoj de UEA/TEJO

Itala majstroverko en "Oriente-Okcidento"

Sojle de la Universala Kongreso en Florenco enviciĝis en la eldonserio "Oriente-Okcidento", aŭspiciata de UEA, la romano "La gefianĉoj" de Alessandro Manzoni. Tiu ĉi majstroverko de la itala literaturo estas esperantigita de Battista Cadei kaj eldonita de Itala Esperanto-Federacio. La 495-paĝa volumo aperas kiel n-ro 41 en la serio.

"La gefianĉoj" estas verko, kiun konas ĉiu italo. Manzoni (1785-1873) publikigis ĝin unuafoje en 1827, sed poste poluris ĝin kaj en 1840 aperis la definitiva eldono. Manzoni strebis al nobla sed facile komprenebla lingvaĵo, adiaŭis la tiaman eliton, latineskan kaj retorikan prozon. "La gefianĉoj" estas historia romano pri la mistraktado de senpotenculoj. Ĝi disvolviĝas en la 17-a jarcento, sed la aŭtoro fakte aludas okazaĵojn en sia propra jarcento kun tia majstreco, ke lia verko estas tute sen-tempa kaj universale valida.

La libro estas mendebila ĉe la Libroservo de UEA por 30 eŭroj.

(el komuniko de UEA koncizigis mm)

FESTO fine de aŭgusto en Francio

Ĉi-jare la tradicia aranĝo de JEFO, granda junulara Esperanta festivalo FESTO, okazos fine de aŭgusto (dim/dim) 2006-08-20/27, en la Esperanta kastelo Grezijono, 200 km sudokcidente de Parizo.

La Francia landa sekcio kunlaboras kun faka sekcio EUOKKA, por krei bonegan muzikan programon. Partoprenos famaj muzikgrupoj, estos teatraĵoj, filmoj, prelegoj, kaj renkontiĝo de la tradukista asocio Libereco por lingvoj. Pli detalaj informoj ĉe <http://festo.esperanto-jeunes.org/>

(el TEJO-aktuale koncizigis mm)

83a Kongreso de Germana Esperanto-Asocio

2-5 junio 2006 en Braunschweig (meza Germanio)

GEA baldaŭ 100-jara! La 19an de majo 1906 estis fondita en Braunschweig (Brunsviko) la Germanlingva Esperantista Societo (Deutschsprachige Esperantisten-Gesellschaft) kun membroj el Germanio, Aŭstrio kaj Svislando.

La retpaĝo atingeblos de la centra hejmpaĝo de GEA (<http://esperanto.de> sub Aktuell) aŭ rekte de <http://jubileagek.ic-herzberg.de>.

(mm)

Eventokalendaro de EAF

2006

27.5.2005 Koulutuspäivä “Tiedotteesta telkkariin, otsikosta eetteriin”, Helsinki (EAF)

30.6-1.7.2006 Esperanton kielen ja kulttuurin esittelytilaisuus – Kleriga semajnfino, Hämeenlinna (EAF)

3-7.7.2006 Esperantokursoj en Valamo (Valamon kansanopisto)

29.7-5.8.2006 Universala Kongreso, Florenco, Italio (UEA)

Dojeno de la delegita reto 100-jarula

La dojeno de la Delegita Reto de UEA, s-ro René Llech-Walter, iĝis 100-jara la 30-an de marto. Jam ekde 1932 li plenumas la oficon de delegito de UEA en sia hejmurbo Perpignan en Francio. De 1955 ĝis 1964 li estis ankaŭ estrarano de UEA.

Llech-Walter estas unu el la plej konataj kulturaj agantoj inter katalunoj en Francio. En 1982 la franca eduka ministerio rekonis lian aktivadon per sia plej grava distingo, promocio al la rango de Komandoro en la Ordeno de Akademiaj Palmoj.

(el komuniko de UEA redaktis mm)

Forpasis Poul Thorsen (1915-2006)

La 30-an de januaro forpasis la dana Esperanto-poeto Poul Thorsen en la aĝo de 91 jaroj. Thorsen, kiu profesie estis instruisto, lernis Esperanton en 1931 kaj jam baldaŭ ekaktivis en la laborista Esperanto-movado. En la 50-aj jaroj Thorsen gajnis plurajn premiojn en la Belartaj Konkursoj de UEA. De 1954 ĝis 1962 li gvidis la eldonejon “Koko” kaj estis kunredaktoro de la altnivela kultura-literatura revuo “Norda Prismo” de 1957 ĝis 1974. En 1997 li kaj lia edzino Roma donacis al UEA grandan monsumon por starigi la kason Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen, kiu intertempe helpis kelkdekon da Esperanto-bibliotekoj por pliriĉigi siajn kolektojn.

(el komuniko de UEA koncizigis mm)

6-13.8.2006 Internacia Junulara Kongreso, Sarajevo, Bosnio (TEJO)

16-17.9.2006 Aŭtunaj Tagoj, Haukipudas (Oulu-regiono)

2007

28.4.2007 100-jariĝo de EAF

Lernu Esperanton efike kaj amuze

**Esperanto-kursoj en la
Popola Instituto de Valamo
3.-7.7.2006**

Esperantokurso en la mirinda monaĥeja atmosfero en orienta Finnlando estos ĉio kion vi volas pri lingvokurso: efika instruado kaj amuza kunestado. Kaj ĉio tio en belega naturo kun bonhumoraj kaj bonkoraj homoj.

Ĉiutage estos instruado ĉirkaŭ 5 horojn: Tiuj, kiuj ne ankoraŭ konas la lingvon komencas de la unuaj aferoj. Aliaj profundigos sian lingvoscion pere de la daŭriga kurso, kiam spertuloj povas helpi la novulojn. Vi kiuj jam scipovas la lingvon diskutos, aktoros, legos artikolojn kaj resumojn ilin, aŭskultos/faros prelegetojn ktp.

Posttagemeze kaj vespere estos aranĝataj ekskursoj en la ĉirkaŭaĵo. Vespere estos komuna programo kun prelegetoj, kunludado, kunkantado kaj alia muzikado, saŭnumado en vera fumsaŭno ĉe lago, manĝado ktp. Ĉio tio en trankvila etoso de la monaĥejo: laŭvole eblos al vi viziti ortodoksan diservon en belegaj preĝejoj en la areo.

La loko: Popola Instituto de Valamo, Heinävesi, orienta Finnlando. **Instruistoj:** Atilio Orellana Rojas el Nederlando/Argentino kun dua instruisto el Finnlando. **Kursogvidanto:** Tiina Oittinen. **Prezoj de la kursosemajno** inter 190 – 260 eŭrojn (sen manĝoj) depende de tranoktado.

Notu, ke en la Popola Instituto de Valamo la personaro nek parolas esperanton nek respondas al esperantlingvaj retroŝtoj. Bonvolu kontakti pere de EAF. **Kontaktuloj:** **Tiina Oittinen**, sekretario de EAF, **adreso:** Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku, Finnlando, **tel:** 02-2305319, **eafsekretario@esperanto.fi**. **Carola Antskog**, sekciestro de ILEI en Finnlando, **adreso:** Brokärrvägen 89, 25700 Kimito, Finnlando, **cantskog@kolumbus.fi**

Oppia ja iloa Valamossa

**Esperanto-kurssit
Valamon kansanopistossa
3.-7.7.2006**

Esperantokurssi Valamon kansanopistossa on kaikkea sitä, mitä odostat kielikurssilta: tehokasta opiskelua ja mukavaa yhdessäoloa. Ympärilläsi on ihana suomalainen luonto ja luostarin ihmeellinen ilmapiiri. Valamon kurssiviikolla tutustut esperanton kieleen ja kulttuuriin ja lisäksi kurssiviikon aiheet voivat sivuta mitä tahansa maan ja taivaan välillä ja kauempaakin.

Pääopettaja, argentiinalaissyntyinen Atilio Orellana Rojas on kansainvälisesti arvostettu opettaja. Päätyökseen hän työskentelee kansainvälisessä esperanto-opistossa IEI:ssä Haagissa, Hollannissa. Hänen lisäksi kurssilla on suomenkielinen opettaja ja kurssivastaava. Kurssitasoja on osallistujien mukaan kaksi tai kolme: aloittelijat, jatkajat ja keskustelijat. Alkeiskurssia vetää suomenkielinen opettaja, mutta alkeiskurssilaiset pääsevät jo heti ensimmäisistä päivistä lähtien käyttämään kieltä ulkomaalaisen opettajan kanssa: Atilio opettaa heitä muutaman tunnin verran päivittäin.

Kurssin hinta on majoituksesta riippuen 190 – 210 euroa. **Ilmoittautuminen:** suoraan Valamon kansanopistoon, **osoite:** 79850 Uusi-Valamo, **puhelin** 017-5701400, **faksi** 017-5701402, **sähköposti:** *valamon.kansanopisto@valamo.fi*.

Kurssi järjestetään yhteistyössä Suomen Esperantoliiton kanssa. Yhteyshenkilöt, joilta saa lisätietoja: **Tiina Oittinen** (liiton sihteeri ja kurssivastaava), Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku, **puh:** 02-2304319, **eafsekretario@esperanto.fi** ja **Carola Antskog** (Suomen opettajien esperantoyhdistyksen puheenjohtaja), Brokärrvägen 89, 25700 Kimito, **cantskog@kolumbus.fi**.

Tervetuloa niin uudet kuin vanhat Valamon kävijät!

Turun talvipäivät lehdissä

Turussa pidetyt talvipäivät saivat eniten palstatilaa Aamuset-lehdessä 22.3.2006. Se on keskiviikkoisin ja lauantaisin Turun alueella ilmestyvä ilmaisjakelulehti.

Lehti haastatteli Turun kerhon puheenjohtaja Tiina Oittista, joka arvioi Turun seudulla olevan noin 70 esperantistia. Kerho järjestää alueella koulutusta ja opintopäiviä, joissa opetellaan ja käytetään kieltä. Ulkomaalaisten esperantistien tapaaminen on tärkeä osa toimintaa. Nykyinen Turun esperanto-yhdistys perustettiin 1961, mutta harrastus alkoi jo sata vuotta sitten Turussa Verda Stelo -yhdistyksessä.

Suomen Esperantoliiton talvipäivistä lehdessä esiteltiin tapaaminen Auralan kansanopistossa ja siellä esillä oleva kielen historiasta ja kulttuurista kertova näyttely, mm. Martti Vihannon postimerkki- ja postikorttikokoelmat. Samalla Auralassa annetaan tietoa esperanton opiskelusta.

Esperanton synnystä lehdessä kerrottiin Zamenhofin työstä, pyrkimyksestä luoda yhteinen kieli, joka ei kuitenkaan korvaa kenenkään äidinkieltä, ja siitä, että kieltä harrastetaan ympäri maailmaa, puhujia on arviolta muutama miljoona.

”Valtakunnalliseen esperantistien nuorisjärjestöön on tullut mukaan enemmän nuoria viime aikoina”, sanoi Tiina Oittinen. ”Kiinnostus kieltä kohtaan on hienoisessa nousussa.”

Åbo Underrättelser esitti 24.3.2006 Suomen Esperantoliiton puheenjohtaja Anna Ritamäelle neljä kysymystä esperantosta, kun liiton talvipäivät olivat viikonloppuna Turussa. Anna esitelti esperanton kansainväliseksi tasa-arvon kieleksi, kun se ei ole kenenkään äidinkieli. Se on helpompi oppia kuin mikään kansallinen kieli. Esperantoa käytettäessä puhutaan tasa-arvoisesti

samoista lähtökohdista. Englannilla on nykyisin vähän sama rooli, mutta sen käyttö antaa paremman aseman sitä äidinkielenään käyttävälle amerikkalaisille ja englantilaisille.

Anna kertoi tutustuneensa Esperantoon partiolaisten lehdessä 1986. ”Nyt osaan sitä vähän paremmin kuin suomea”, hän sanoi. Annan mukaan maailmassa 100 000 ihmistä osaa kieltä hyvin ja 20 miljoonaa jonkin verran.

Åbo Underrättelser mainitsi myös talvipäivien Esperanton historiasta kertovasta näyttelystä ja tulevasta Suomen Esperantoliiton 100-vuotisjuhlavuodesta 2007.

Turun Sanomat noteerasi talvipäivät pienellä uutisella 24.3.2006. Siinä kerrottiin talvipäivien järjestämisestä Auralan kansanopistossa, Esperanto-historiasta kertovasta näyttelystä ja Verda Stelo -yhdistyksen ja nykyisen Turun Esperanto-yhdistyksen perustamisesta. Samalla mainittiin, että Esperantoliitto valmistautuu ensi vuoden 100-vuotisjuhlaansa.

Yhteishyvä-lehdessä, numero 3/2006, ilmeisesti muualla kuin pääkaupunkiseudulla ilmestyvässä painoksessa oli juttu maailman kielten määrästä ja katoamisesta. Sen yhteydessä oli pieni laatikkojuttu esperantosta, sen kehittämisestä, rakenteesta, sanastosta ja kieliopista. Sitä käytetään 120 maassa.

